

& La kampulo kaj la korniko:

< Maĵora rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 576 paŝoj dum 7 minutoj. Minora rekante ripete 11 sed rekante 9 el 19 batoj por strofo, entute 342 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #4448. Satiro pri la jam delonge altaj impostoj, kiujn en fruaj epokoj kolektis reĝaj inspektistoj ("feŭdoj"). Du diversaj melodioj kaj rekantaĵoj sed cetere sama teksto. El sveda tradukis Kukoletto (1993). Klarigoj (*): '1,9 Kva = kiu. '13,17 Als = tiel, ke ĝi poste estas.> >

(#Melodioj:

((#Maĵora: <2,5:4> /Do MiSo Do MiSo /Mi So do o; /La Fa La do /SoSo SoFa Mi i;So /Fa FaLa Re ReFa /Mi So Do o;/Re Re Fa TI /ReDo DoDo Do o;)

?

(#Minora: <1,4:> ;/LaLaLa LaLaLa /miimi mi; /faaso faami /reldore mii;mi /doremi doremi /reeTi doodo; /TiiSo La /Laami milredo /TiiSo La a;)

)×18)+

(&Strofoj:

'1

(&Maĵora:

/Iris kampulo en /pinarbar'

(×:; /**hejom fejom /fale rale ra** ;)

li /vidis kornikon kan/tantan klare

(×:; /**hejom fejom /fale rale ra**.)

?

(&Minora:

/Iris kampulo (: en /pinarbar')

(×:; /**falu lej**.)

(: en /pi2narbar' ;)

li /vidis kornikon kva* /kantis klare

(×:; /**Falu lej, /fale lu2le /lulan lej**.)

'2 Ektimis kampul' kaj rekuris al bien' "Aj, panjo, min mordos korniko jen!"

'3 Ŝpinis l' ulino ĉe sia ŝpinrad' "Ĉu homon atakus kornik' per mordad'?"

'4 Streĉis pafarkon kampul' per genu' li pafis kornikon en altsitu'

'6 Venis mesaĝo de l' inspektist' "Vi pafis kornikon el kia konsist'?"

'7 "Kornik' en la dom' estas pro mia streb' da kandel' dek du funtojn mi faris el seb'

'8 El plumoj por ĉiu lito kusen' eĉ por servistaro sufiĉis la ben'

'9 Ventumilojn el flugilpluma afer' kvajn* uzos knabinoj dum bela veter'

'10 El beko preĝejan turpinton por fest' ni faris preĝejturan kokon el krest'

'11 Knedujon ni faris el ĝia krani' ne estis pli granda dum homhistori'

'12 La kolo korniĝis por sona blov' ĝi sonis pli forte ol grandulbov'

'13 Ŝuparojn dek du el ĝia stomak' restaĵon ni faris als* granda sak'

'14 Intestoj fariĝis dekducola ŝnur' forkego por sterko el ĉiu krur'

'15 La viando metiĝis en tinojn kun sal' krom steko acida, por paĉjo regal'

'16 Ni faris velŝipon el ĝia ripar' plej grandan velintan sur nia mar'

'17 Postaĵon mi faris als* kudrista ring' korniko por ni estis bona ating'."

'18 Do kantu la kanton ajnulo laŭ plaĉ' nenion forprenu pro l' impostaĉ'